Christian Winther,

# Postsonor'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ne reen vidas kun doloro
mi al la floro-tempo nun;
kaj ne bedaŭras mia koro,
ke nun ne brilas jam la sun'.

Mi scias ja, ke proksimiĝas
migrado mia al la fin',
ke vintre nun la jar' finiĝas,
ke l' tombo enhejmigos min.[2]

Sed tamen en la koro sentas
mi varman ĝojon de somer',
sonadon, kiu ne silentas,
kaj fajron de la primaver'.

Pendigis mi nur mian liron
por dormo, ĝin ne metis for;
vekiĝas ĝi, se la sopiron
por kanti sentas mia kor'.

*Traduko de la Dana poemo "Efterklang" de* Christian Winther *(Kristiano Vintero, ∗1796 – †1876) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-02.*

*MR-067-3a / Arg-236-469 (2004-05-14 09:56:45)*

Christian Winther,

# Efterklang

Jeg ser med vemod ej tilbage
til vårens stille blomstertid;
mit hjerte fører ingen klage,
for solen ej er sommerblid.

Jeg ved jo nok, min vandring vender
nu ned i vintrens kolde favn,
hvor stilhed bor, hvor året ender
i gravens hjem o sikre havn.

Men i mit hjertes dyb jeg føler
endnu en vår, en sommerlyst,
en ild, som vintrens sne ej køler,
en klang, som aldrig vorder tyst!

- Når da til slummer cithren hænges,
jeg aldrig siger den farvel;
den vågner brat, så snart jeg længes,
og stemmer altid med min sjæl.

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo estas* Christian Winther *(Kristiano Vintero, ∗1796 – †1876).*

*Arg-236-468 (2004-05-14 09:49:39)*

[2] aŭ: ke tombo enhejmigos min.